

ĈEA-Retkomunikoj 2013/01



ĈEA-Retkomunikoj estas neregula informilo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio sendata al ĉiuj rete atingeblaj membroj de ĈEA kaj ankaŭ al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperanto-movado en Ĉeĥio. Ĝi neniam enhavas aldonaĵojn. Se vi tamen ne volas ricevadi ĝin, sufiĉas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

Enhavo:

1. VORTOJ DE LA ĈEFREDAKTORO
2. RETKOMUNIKOJ EN PDF-FORMATO
3. ĈEA VENKIS EN KONKURSO DE LA FONDAĴO CIGNO
4. BONVENON AL BOHEMIA PARADIZO!
5. MATERIALOJ POR LA NOVA MUZEA EKSPONIZIO SERĈATAS!
6. MUZEA NOKTO EN SVITAVY 2013
7. PASIGU KUN NI SEMAJNFINON EN ESPERANTO-URBO!
8. AKTUALAĴOJ EN WWW.ESPERANTO.CZ
9. PLUJAJ NOVAĴOJ EN LA MUZEA PAĜO ĈE IPERNITY
10. PLUJAJ AKTUALAĴOJ
11. ĈEJ AKTIVAS
12. LISTO DE ARANĜOJ
13. BONDEZIROJ

1. VORTOJ DE LA ĈEFREDAKTORO

Jen la unua numero de ĈEA-retkomunikoj en la jaro 2013. Denove plena de freŝaj informoj, sed daŭre kreita en sama modelo, kiun mi uzis lastan jaron. Mi ŝatus ja la duan numeron de ĈEA-retkomunikoj iom plibonigi, ekzemple aldoni iun novan rubrikon - pro tio mia demando al vi, kara leganto? Kion vi ŝatus trovi en ĈEA-retkomunikoj? Ĉu ekzemple rubrikon "Ŝercoj"? Skribu al mi viajn opiniojn. Antaŭdankon kaj agrablan legadon!

PS: Ŝparu la naturon - se eblas - ne printu tiun ĉi eldonon de ĈEA-retkomunikoj, se ne nepre necesas. Estu amiko kun la naturo!



Redaktoro Miroslav Hruška

2. RETKOMUNIKOJ EN PDF-FORMATO

Kiel tradicie, ankaŭ tiu ĉi eldono de ĈEA-Retkomunikoj en PDF-formato elŝuteblas [ĉi tie](#).

Arkivo de Retkomunikoj troveblas [ĉi tie](#).

3. ĈEA VENKIS EN KONKURSO DE LA FONDAĴO CIGNO

La 1-an de marto ni estis oficiale informitaj, ke Ĉeĥa Esperanto-Asocio venkis en internacia konkurso proklamata ĉiujare fare de la japana Fondaĵo CIGNO. La fondaĵo, starigita de Miyoshi Etsuo, antaŭe servis por subteno de Esperanto-movado en ekssocialismaj kaj tn. triamondaj landoj. Ekde 2012 ĝi estas destinita por Esperanto-asocioj de la landoj de la

Eŭropa Unio en la sfero de publika informado pri Esperanto. La premion por 2012 akiris Esperanto-Asocio de Britio.

En la konkursa raporto estis priskribitaj kaj dokumentitaj 200 realigitaj diversspecaj aktivecoj (ekspozicioj, ĉeflingvaj artikoloj, radioelsendoj, televidriportoj, publikaj prelegoj, kulturaj aranĝoj, konkreta kunlaboro kun neesperantistaj organizoj k.a.).

Se vi interesiĝas pri la kompleta listo de informa agado de ĈEA, vizitu [jenan paĝaron](#).

4. BONVENON AL BOHEMIA PARADIZO!

Ni invitas vin al familia pensio ESPERO en Skokovy, kie okazos samtempe la 37-a Printempa Seminario (15.-21.4.) kaj la 8-a Sabla Printempo (18.-21.4.).

Antaŭtagmeze eblas laŭinterese partopreni diversgradan lingvoinstruadon aŭ trejnadon pri realigo de sonregistraĵo. Ekskursaj kaj amuzaj programoj (filmoj, kantado ktp) estos komuna por ambaŭ aranĝoj. 420,- CZK/persono/tago por tranokto + tri ĉefaj manĝoj, + kontribuo por organizaj kaj programaj elspezoj (100,- ĝis 200,- CZK laŭ nombro de tagoj). Pro gravaj kialoj vi povas aliĝi ankaŭ por malpli da tagoj ol indikite!

Atendas vin novaj scioj kaj interesaj travivaĵoj en la bela naturo kaj amikeca etoso!

Kontakto kaj aliĝoj: drahotova@esperanto.cz (Printempa Seminario) aŭ pisek@esperanto.cz (Sabla Printempo).




Retejo de la pensio Skokovy: <http://home.tiscali.cz/penzionespero/esperanto/espindex.htm>
Vidu [Fotogalerion de la aranĝo kaj de la ĉirkaŭaĵo](#).

5. MATERIALOJ POR LA NOVA MUZEA EKSPOZICIO SERĈATAS!

La nova tutjara ekspozicio, kiu estos inaŭgurita la 8-an de junio 2013 en Svitavy, nomiĝos „Esperanto kaj muzoj“. Krom poezio kaj dramo ni celas prezenti ankaŭ artverkojn de esperantistoj aŭ subtenantoj de Esperanto, ĉu profesiuloj, ĉu amatoroj, el diversaj landoj. Krom figura arto (penetraĵoj, desegnaĵoj, grafikaĵoj, plastikaĵoj) bonvenas ankaŭ artaj manlaboraĵoj (ceramikaĵoj, punktoj, brodaĵoj, penetraĵoj sur vitro aŭ silko, dekoracioj el naturmaterialoj, drataĵoj ktp). Pri organizaj kaj teknikaj kondiĉoj de pruntedono bv. kontakti Pavla Dvořáková ĉe muzea.ekspozicio@gmail.com. Ni antaŭĝojas viajn proponojn!

6. MUZEA NOKTO EN SVITAVY 2013

Okazos sabate la 8-an de junio. Ekde 12:30 komuna tagmanĝo kaj promeno, ekde 14:00 arta esperantlingva programo, ekde 16:00 inaŭguro de la ekspozicio „Esperanto kaj muzoj“ kun akompana programo kaj refreŝiĝo, ekde 18:00 laŭvola partopreno en aranĝoj de Urba Muzeo kaj Galerio kaj amuziĝo. Partopreno en la programo estas komplete senpaga! Ĝis 20.5. (poste sengarantie!!) eblas mendi tranokton en studenthejmo (por 1 aŭ 2 noktoj) kontraŭ 200,- CZK/persono kaj nokto. Dimanĉe antaŭtagmeze proponatas favorpreza ekskurso al proksima renesanca



kastelo en Moravská Třebová. (Antaŭmendo bezonata!) Pagoj okazos surloke.
 Pliaj informoj kaj aliĝoj por tranokto kaj ekskurso ĉe svitavy@esperanto.cz.
 Kontribuemuloj al la kultura programo, bv. skribi al muzea.ekspozicio@gmail.com



7. PASIGU KUN NI SEMAJNFINON EN ESPERANTO-URBO!

Verŝajne estas neniu ĉeĥa esperantisto, kiu ne aŭdus ion pri la unua urbo en la mondo, kiu havas en sia nomo oficialan aldonon „Esperanto-urbo“. Temas pri la germana urbo Herzberg, die Esperanto-Stadt“ rande de la montaro kaj nacia parko Harz.

Se vi ja ankoraŭ ne havis ŝancon viziti la Esperanto-urbon, vi nun havas bonan

ŝancon: aliĝu al la tritaga busekskurso de AEH dum la lasta junia semajnfino (de la 28-a ĝis la 30-a de junio), kiu celas la Esperanto-urbon. Oni tranoktos en Esperanto-medio de la menciita hotelo Zum Pass kaj sub la gvido de la ĉefmotoroj de ICH (Internacia Centro Herzberg) Zsofia Korody kaj/aŭ Peter Zilvar ekkonos ĉiujn vidindaĵojn de la Esperanto-Urbo kaj ties ĉirkaŭaĵo. Ekiro el Pardubice (haltoj en Prago kaj Ústí nad Labem). Urbotrarigardo, vizito de la nacia parko Harz, revenvoje trarigardo de Leipzig. Prezo 2.500,-CZK por transporto kaj 2 tranoktoj kun matenmanĝo. Devontigaj aliĝoj plej malfrue ĝis la 7-a de aprilo! Interesiĝantoj aliĝu ĉe Lenka Angelová l.angelova@seznam.cz aŭ skribu al aeh-ikeh@volny.cz.

8. AKTUALAĴOJ EN WWW.ESPERANTO.CZ

[Interesaj filmoj: Pasporta servo kaj aliaj mallongaj filmoj](#)

[Humprey Tonkin resumas la jubilean jaron en Reta Kinejo](#)

[Esperanto kiel la 24-a lingvo de EU?](#)
[Subtenu la francan peticion!](#)

Nur en la ĉeĥa lingvo: (pouze v češtině):

[Překlad zajímavého životopisu k dispozici v elektronické podobě](#)
 (Traduko de interesa biografio disponeblas en elektronika formo)

[Jazyková rubrika č. 1 - "Navazujeme styky"](#)

(Lingva rubriko n-ro 1 - "Ni ligas kontaktojn") - unua parto el la nova serio, alportonta ĉiumonate unu pluan prilingvan artikolon elektitan el la malnovaj numeroj de la gazeto "Starto"

[Rodilí mluvčí esperanta \(u příležitosti 21.2. - Dne mateřského jazyka\)](#)



(Denaskaj parolantoj de esperanto (okaze de la 21-a de februaro - tago de la gepatra lingvo))

[Nové články o esperantu v českém tisku a na webu](#)

(Novaj artikoloj pri esperanto en ĉeĥaj medioj kaj en interreto)

[Dvořákova "Rusalka" v esperantu v Českém rozhlase](#)

("Rusalka" de Dvořák en esperanto en Ĉeĥa radio)

[Hlava XXII, Jaroslav Hašek a esperanto](#)

(Kapo 22, Jaroslav Hašek kaj esperanto)

9. PLUAJ NOVAĴOJ EN LA MUZEA PAĜO ĈE IPERNITY

PAROLA VORTO:

[Maksimoj de Zamenhof](#) - ekspresa sonprezento de la plej gravaj kaj la plej konataj pensoj kaj eldiroj de L.L.Zamenhof pri Esperanto

[Esperanto: Ĉu Racio aŭ Magio?](#) - Instiga kaj pensiga prelego de Bertil Wennergren dum la kongreso de Esperanto-USA en Dalaso (2012)

[Vojaĝo al Zimbabvo](#) - Prelego de Albert Goodheir, prezentita dum la 74a Brita E-Kongreso en 1990

MUZIKO:

[Richard Cocciante - Bel'](#) - Esperanta versio de la fama kanto el la muzikalo „Notre Dame de Paris“ (el Arta vespero dum UK en roterdamo 2009)

[Kaj Tiel Plu - La violonisto](#) - temperamenta kanto en prezento de profesieca kataluna muzikgrupo kantanta ankaŭ en Esperanto

Filmetoj pri Esperanto-Movado:

[ZEOj en Aŭstralio kaj tra la mondo](#)

[Moresnet kaj Amikejo](#) - nederlanda dokumenta filmo (esp. subtekstigita) pri "la unua la Esperanto-lando kiu preskaŭ ekzistis"

[Esperanto geedzigas](#) - Filmeto konkursinta en „Esperanto 125 jara“, interesa raporto pri internacia geedziĝo inter polino kaj brazilo

Muzikaj filmetoj:

[Team - Rakonta Silentado](#) - kanto de la fama slovaka muzikgrupo (omaĝe al vivjubileo de la tradukinto Stano Marček)

[Muzikgrupo Reverie \(Revado\)](#) - Prezenvideo de la duobla albumo "Revado" de la itala etno-progresiva muzikgrupo

Novaj aŭdioregistraĵoj el la projekto „Karel Čapek“

„Rakontoj el dua poŝo“:

[La lastaj aferoj de homo](#) - laŭtleĝas M.Smyčka



[Malapero de sinjoro Hirš](#) - laŭtlegas V. Türk

[Ĉintamani kaj birdoj](#) - laŭtlegas V. Türk ĉeĥlingva originalo de la rakontoj elŝuteblas sur [jena paĝo](#).

Novaĵoj en Fotogalerio de Muzeum.esperanto.cz

[Seminarioj en la pensiono ESPERO en Skokovy](#) - Fotaĵoj de la ekskursloko, de la pensiono kaj de la programo de la antaŭaj seminarioj

[Virtuala kolekto de malnovaj Esperanto-bildkartoj \(ĝis 1939\)](#)

Se vi interesiĝas pri retaj esperantaj radioj, ne forgesu sekvi novajn elsendojn de la Radio Verda Stacio - <http://www.verdastacio.net/> !



10. PLUAJ AKTUALAĴOJ

NOVA INTERRETA TELEVIDO

Ni ŝatus informi pri nova interreta televido, kiun kreis argentina esperantisto Maximiliano Catania. Tiu ĉi nova esperanta rettelevido troveblas sub paĝo <http://www.nexmax.com.ar>, kie nuntempe aperas novaĵoj pri ĉiuj aferoj, ĉu sportaj, ĉu

politikaj, ĉu Esperantujaj, ktp.

NOVA ESPERANTA RONDETO EN ŜUMICE

Apud la urbo Uherský Brod funkcias nova esperanta rondeto sub la gvido de Helena Tlachová. Spertojn de la vizito de la rondeto vi povas legi en [jena artikolo](#).

PREPARADO DE LA 2-A ESPERANTO-LERNEJO EN LA KASTELO BARTOŠOVICE

Verda Stacio – la radio en la lingvo Esperanto kaj Esperanta klubo Ostrava - Vítkovice, invitas vin ĉeesti la duan Internacian Lernejon de Esperanto por komencantoj kaj progresintoj, kiu okazos ekde la 16-a ĝis la 20-a de oktobro 2013 en la kastelo Bartošovice, en norda Moravio, Ĉeĥio. Kastelo situas en la bela parko de vilaĝo



Dum la renkontiĝo de esperanta rondeto en Ŝumice

Bartošovice, nur 6 km de Ostrava flughaveno kaj 4 km de la fervoja nodo Studénka, 20 km de la urbo Ostrava kaj 12 km de la distrikta urbo Nový Jičín. Rekte en la kastelo estas eblecoj de tranoktado kaj ĉiutaga manĝado. Instruado okazos en la moderne aranĝitaj klasĉambroj, situantaj nur 100 m de la kastelo en baza lernejo. Ni preparas por vi nombro de amuzajoj, tiel vi ne enuos. Ĉiujn necesajn informojn, elektronikan aliĝilon kaj informojn pri trafiko troveblas en [tiu ĉi paĝo](#).

11. ĈEJ AKTIVAS

(oficiala organo de ĈEJ redaktata de Marek Blahuš)



Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ) parte dormas pro studa kaj labora okupiteco de la nunaj estraranoj. Baza agado tamen plu disvolviĝas.

La novjaran renkontiĝon JES en Naumburg (Germanio) partoprenis Jan ŠEBETOVSKÝ, Vít MIŠUREC, Vlad DOLEŽAL kaj Zuzana KOŽUCHOVÁ.

[Tutpaĝa artikolo](#) pri esperanto kaj [intervjuo kun Marek BLAHUŠ](#) aperis en la monatrevo "muni.cz" de la Masaryk-Universitato (2/2013, p. 8, eldono 5000 ekz.). La redaktorino iam partoprenis la kurson de Josef VOJÁČEK. Miroslav HRUŠKA vizitis la plenkreskulan klubon en Šumice, el kio rezultis artikolo en la [regiona semajngazeto Slovácké noviny](#). Junulo Michal SEDLÁK skribis [artikolon pri la IJK](#) en Hanojo por retejo de amikoj de Vjetnamio.

ĈEJ-anoj en Brno kaj Prago akceptis du eksterlandajn gastojn: japana sinjorino NEGIŠI Saĉiko venis komencfebuare, germana junulo Jonas SAUER mezmarde. Ambaŭokaze en Brno kunvenis ĈEJ-klubo en teejo, 4-oje respektive 11-oje. Jonas antaŭe vizitis semajnfinan renkontiĝon BIERo organizitan de E-mentál kaj ĈEJ en Vyškov (8-an ĝis 10-an de marto, ĉeestis 2 junaj ĈEJ-anoj). En Brno li partoprenis voĉregistradon por la projekto Deutsch.info de E@I, pro kiu alvenis ankaŭ slovakaj esperantistoj Peter BALÁŽ kaj Katarína NOSKOVÁ. Kiam de la 18-a ĝis la 20-a de februaro ĉe Masaryk-Universitato okazis plenkunsido de la projekto, ĉeestis krom tiuj du kaj Marek BLAHUŠ ankoraŭ 5 pliaj esperantistoj (el Germanio, Slovenio, Kroatio).



Dum la renkontiĝo de junulara klubo de Brno en teejo


La praga klubo de ĈEJ aldone kunvenis la 15-an de januaro kvinope kaj Bára ZÁVODSKÁ elesperantigis por la Nacia muzeo leteron verkitan de Zamenhof en 1911. Laste, en teatro Polárka en Brno la 23-an de marto, ses esperantistoj (inkl. 2 junulojn) spektis kadre de infanfestivalo Festivadlo la teatraĵon R.U.R. prezentitan en esperanto de teatro DOMA el Svitavy (kiun anas juna esperantisto Matěj NÁROŽNÝ).

Ankoraŭ en 2012 membroj de la praga ĈEJ-klubo ĉeestis Zamenhof-tagon en Bratislavo kaj la aranĝon E-mentala Kristnasko. Martin BUREŠ agas inter esperantistoj de Liono kaj gastas en Francio kaj Germanio. Retpaĝaro de ĈEJ troviĝas ĉe <http://cej.esperanto.cz/>

12. LISTO DE ARANĜOJ

2013-04-04/-04-26: Migra ekspozicio „Ĉu Esperanto estas morta lingvo?“ - en Urba biblioteko Mladá Boleslav

2013-04-15/21: [37-a Lingva seminario](#). Tradicia semajna seminario en pensiono ESPERO en Skokovy (norde de Prago).



2013-04-17: Diskuto en la ĉeĥa lingvo pri migra ekspozicio „Ĉu Esperanto estas morta lingvo?“ - en Urba biblioteko Mladá Boleslav

2013-04-18/21: [8-a Sabla printempo en Skokovy](#). Kadre de la 37-a Lingva seminario, kun la ĉeftemo "Voĉregistrado".

2013-05-?/06-?: Migra ekspozicio „Ĉu Esperanto estas morta lingvo?“ - en Urba biblioteko Benešov

2013-05-18: [Printempa renkontiĝo de EK Ŝumperk](#).

2013-05-17/19: [Komuna kunveno de ĉeĥa kaj slovaka sekcioj de IKUE](#).

2013-05-17/20: [90-a Germana Esperanto-Kongreso](#). Kongreso de GEA kaj festo okaze de la 125-a jubileo de la Nuernberga Esperanto-grupo.

2013-06-08/09: [Muzea Nokto en Svitavy](#) kun inaŭguro de la nova tutjara ekspozicio (ĉi-foje pri arta kreemo de esperantistoj) Info: svitavy@esperanto.cz

2013-06-15: Infana Tago en Svitavy. Informoj: svitavy@esperanto.cz

2013-06-16: [Renkontiĝo sur la pinto de Granda Ĉantorio](#). Turisma renkontiĝo de ĉeĥaj, slovakaj kaj polaj esperantistoj.

2012-06-28/30: Semajnfino en Esperanto-urbo. Busekskurso el Pardubice/Prago al Herzberg am Harz (Germanio). Info: aeh-ikeh@volny.cz

2013-06-30/07-13, 2013-07-14-27, 2012-07-28/-08-09: Tri etapoj de la 61-a Somera Esperanto-Tendaro en Lančov apud Vranov-lago. Info: info@set-lancov.cz, <http://www.set-lancov.cz>

2013-07-12/20: Somera Esperanto-Studado. Aranĝo en Slovakio ideala por komencantoj, kun bunta programo. Nunjare en urbo Martin. Pli da informoj sur [jena ligilo](#).

2013-07-20/27: [La 98-a Universala Kongreso de Esperanto](#). La plej grava Esperano-aranĝo de la jaro okazos ĉi-foje en la ĉefurbo de Islando.

2013-08-03/10: [KELI-kongreso en Svitavy](#).

2013-08-09/11: [16-a renkonto de ekstendaranoj](#) (de SET), informoj:

2013-09-07: La 7-a Postferia Renkontiĝo (plej probable en Vodňany/Bavorov) Info: pisek@esperanto.cz

2013-09-20/22: [ARKONES - ARTaj KONfrontoj en ESperanto](#). Tradice denove en pola urbo Poznano.

2013-09-28/29: [Jubilea solenaĵo en Svitavy](#). Festoj omaĝe al la kvina naskiĝdatreveno de Esperanto-Muzeo kaj 80 jaroj de esperanto en Svitavy.

2013-10-16/20: [La 2-a Internacia Esperanta Lernejo](#). Intensaj Esperanto-kursoj por komencantoj kaj progresintoj (kiel instruanto partoprenos ankaŭ Stano Marček). Okazloko (tranoktado, manĝado kaj instruado): kastelo Bartošovice, 20 km sudokcidente de Ostrava, en la centro de la naturrezervejo Poodří.

2013-10-25/28: [Konferenco de Ĉeĥa Esperanto-Asocio](#). Pinta aranĝo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kun labora traktado, temaj seminarioj kaj programoj ekskursaj, kultura kaj amuzaj. Okazloko: Nymburk.

2013-11-30: [Antaŭkristnaska renkontiĝo en Písek](#).

Ĉu vi ne trovis vian aranĝon ĉi tie? Ne kulpigu nin, sed sendu la informon pri ĝi al retkomunikoj@esperanto.cz. Ne eblas envicigi aranĝon, pri kiu ni ne scias.

13. BONDEZIROJ

Nome de la redaktokonsilio de ĈEA-retkomunikoj kaj ankaŭ propranome mi deziras al ĉiuj abonantoj de la ĈEA-retkomunikoj gajan Paskon. Miropiro (Miroslav Hruška), redaktoro de ĈEA-retkomunikoj

ĈEA-RETKOMUNIKOJ 2013/1

Kontakto kun ĉefredaktoro: Miroslav Hruška – miropiro2312@gmail.com

Redakta teamo: Petr Chrdle, Pavla Dvořáková, Marek Blahuš

